

Heinrich Neye,
Gaja kajto

tradukita de Manfredo Ratislavo

Mi havis kajton iam
el bunta bril-paper'.
Gajige estis, kiam
ĝi flugis tra l' aer'.

Post ĝia start' subite
rapidis supren ĝi;
entuziasmigite
ĉielen strebis mi.

Jen super nia domo
eĉ flugis gaje ĝi,
kaj ĝojis ĉiu homo
vidante tiun ĉi.

Luliĝis ĝi envente,
malsupren vidis ĝi,
rigardis ĝi silente
sur tiun mondo ĉi.

Nun jena temp' pasinta
delonge estas for;
la kajto leviĝinta
vidiĝas en memor'.

*Traduko de la Germana poemo "Fröhlicher Drachen" de HEINRICH NEYE (*1913-02-27 – †2002-07-18) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2001-12.*

MR-373-1 / Arg-105-212 (2006-01-23 09:56:44)

La origina germanalingva versio de tiu ĉi poemo aperis en 2001-10-18 en la germana agronomia revuo "Landwirtschaftliches Wochenblatt" (Postfach 4929, D-48028 Münster, Germanio, tel. +49-(0)251-51012-24 aŭ +49-(0)251-51012-35, ret-adreso: redaktion@wochenblatt.com, retejo: www.wochenblatt.com).